

# Ora Ĵurnalo

ĴURNALO, KIU NE APERAS ĈIUTAGE, SED LEGERBLAS ĈIUTAGE

Numero 81, Februaro 2025



Evert Taube ekster la Opero. Li estis simbolo de la insularo de Gotenburgo.

Magazino por kulturo kaj plezuro

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

**[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)**

## Enhavo

Enhavo.....	2	El Odessa, Ukrainio .....	15
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	La eksperimento № 3824, <i>Tatjana Auderskaja</i> .....	15
Espeporko meditas.....	3	Klientoj venas, klientoj iras... ..	16
Noto, <i>Walter Klag</i> .....	3	Kunderna komer, kunderna ĝar.....	16
Evert Taube – la sveda nacia bardo .....	4	Pri vikingaj vojaĝoj .....	18
Evert Taube – den svenske nationalskalden..	4	La nornoj en la nordlanda mitologio .....	18
Stokholma melodio .....	5	Eksterterano vizitos Berlinon, <i>Ronald Schindler</i> .....	19
Dana okazaĵo dum la Holokaŭsto.....	6	Kritiko, <i>Ronald Schindler</i> .....	19
En dansk händelse under Förintelsen.....	6	Kiuj nomoj estis la plej popularaj en 2024 en Svedio por novnaskitoj?.....	20
La nacia tago de la sameoj .....	7	Veteroj .....	20
Samernas nationaldag.....	7	La mirinda insularo de Gotenburgo.....	21
Sur Hyppeln kun la Ornitologia Asocio de Gotenburgo, <i>Jan Hellström</i> .....	8	Göteborgs fantastiska skärgård.....	21
På Hyppeln med Göteborgs Ornitologiska Förening, <i>Jan Hellström</i> .....	8	Somera seminario en Esperanto ĉe Nimbusgården, Öckerö, ekster Gotenburgo 23–25 majo 2025.....	23
Plenluno en Finnlando, <i>Raita Pyhälä</i> .....	9	Sommarseminarium i esperanto på Nimbusgården, Öckerö, utanför Göteborg 23–25 maj 2025 .....	23
Memorindaĵo ĉe Morups Tånge, <i>Renate Säfström</i> .....	10		
Nordo kaj sudo, <i>Jan Bondesson</i> .....	11		
Norr och söder, <i>Jan Bondesson</i> .....	11		
Nova monero 5000 Steloj el plateno, <i>Walter Klag</i> .....	14		

## Pri Ora Ĵurnalo

*Ora Ĵurnalo* estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com) kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, [ingegerd.granat@gmail.com](mailto:ingegerd.granat@gmail.com). Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, [arensian@hotmail.com](mailto:arensian@hotmail.com).

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato. Ni deziras kontribuaĵojn pri kulturo, naturo, lingvo, vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj.

*Ora Ĵurnalo* n-ro 81 ankaŭ troviĝas en versio por la poŝtelefono ĉe [www.esperanto-gbg.org/81](http://www.esperanto-gbg.org/81)



## Espeporko meditas



*Nimbusgården, Öckerö.*

- ◆ La 2an de februaro **Renato Corsetti** forpasis. Li regule legis Ora Ĵurnalon kaj foje kontribuis per artikolo pri komencantoj. Li admonis nin bone prizorgi ilin, ili ja estas la estonteco de Esperanto. Renato mankas al ni.
- ◆ La februara numero spegulas memortagojn – **la Holokaŭston**, la 27an de januaro, **la Samean tagon**, la 6an de februaro.
- ◆ La lumo ja pli kaj pli revenas al la nordiaj landoj. Ankaŭ lunlumo estas bonvena, kiel en la finnaj bildoj de *Raita Pyhälä*.
- ◆ Vivi en la norda parto de Svedio kun malmulte da suno vintre, estas streĉa por multaj, sed se oni elkreskas tie oni ja trovas tion normala afero. *Jan Bondesson* rakontas pri sia elkresko en Svappavaara, tute alia ol la elkresko de liaj infanoj en Alingsås.
- ◆ *Orm la Ruĝa* estas la aktuala libro en la Libro-rondo. La idealoj de la vikingoj ne kongruas kun niaj idealoj. Multo por diskuti. Malmulte da virinoj troviĝas, sed



tiuj, kiuj troviĝas – ĉefe Åsa kaj Ylva – estas tre fortaj kun granda influo sur la societo.

- ◆ Superstiĉo en vikingaj tempoj – ĉu superstiĉo nun? La tri ŝpinistoj, la nornoj *Urd*, *Verdandi* kaj *Skuld* decidis kiom longe la vivo daŭru. Kiam la fadeno rompiĝis, la vivo de homo estis finita.
- ◆ *Evert Taube* estas unu el niaj plej konataj kaj amataj trubaduroj. Liaj kantoj ĉiam enhavas interesan rakonton. Ĉe Youtube vi povas trovi liajn verkojn, kun kantado de li aŭ de lia filo *Sven-Bertil Taube*. Nun neniu el ili plu vivas, sed ili lasis kanttrezoron post si.
- ◆ *Ora Ĵurnalo* rakontadas pri Gotenburgo – ĝia historio, kulturo kaj naturo. La regantoj de la urbo baldaŭ devus observi tion kaj doni al ni laŭdon, ĉu ne? 😊
- ◆ Tempo flugas, baldaŭ estos somerkurso – sed printempe, en majo sur insulo ekster Gotenburgo. Legu kaj alliĝu!
- ◆ Ĝis marto! / Siv

## Noto – teksto el SAT-IRO de Walter Klag

### Ĉiam okazas io!

La suno brilas! Skribu artikolon!

Inundo eble venos! Skribu artikolon!

Malmulte da akvo en la riverujo! Skribu artikolon!

La princino gravedas! Skribu artikolon!

La klaŭno diris ion! Skribu artikolon!

Esperantisto pravis! Skribu artikolon!

Vento forblovis papereton! Skribu artikolon!

Muso havas egan tuson! Skribu artikolon!

Kulo pikis bebon! Skribu artikolon!

Ĉiam okazegas io!



*Siv metis ĝin el Sat-iro en Ora-Ĵurnalon. Ora Ĵurnalo skibas pri ĉio inter tero kaj ĉielo.*

# Evert Taube – la sveda nacia bardo

## Evert Taube – den svenske nationalskalden

**Axel Evert Taube** estis naskita la 12-an de marto 1890 kaj unue oni supozis ke li estos naskita malviva, sed kuracisto Silverskiöld alvenis en la lasta momento kaj trovis ke li vivas. Li tiam loĝis en la insulo Vinga kun la familio. La patro Carl Gunnar Taube estis lumtura gardisto inter la jaroj 1889–1905 kaj estis origine de la paroĥo de Bygdeå. La edzino venis el Strömstad kaj nomiĝis Julia Sofia Jakobsson.



En 1 julio 1884 ili estis geedziĝintaj en Kungshamn proksime de Smögen.

Ekstere sur Vinga, la muzike interesita familio kantis kaj la kanzonojn de Bellman kaj kanzonoj el *Gluntarne* de G. Wennerberg.

En aprilo 1906, la familio translokiĝis al Gotenburgo, al la loĝejo de la manaĝero ĉe la ŝipriparejo Kustens Varv, kiu poste estas konata kiel Taubehuset. Tiun saman jaron, Evert eskapas al Stokholmo kaj pasigas sian unuan nokton en tombejo de la preĝejo Klara, kie li sidas plej proksime al la tombo de



**Axel Evert Taube** föddes den 12 mars 1890 och antogs först vara dödfödd men en doktor Silverskiöld kom i sista stund och konstaterade att han levde. Han var då bosatt ute på Vinga med sin familj. Fadern var fyrmästare mellan åren 1889–1905 och hette Carl Gunnar Taube och var ursprungligen från Bygdeå socken. Hustrun kom från Strömstad och hette Julia Sofia Jakobsson.

Den 1/7 1884 gifte de sig i i Kungshamn vid Smögen.

Ute på Vinga sjöng den musikintresserade familjen både Bellmansvisor och ur *Gluntarne*.



*Taubehuset / La domo de Taube*

I aprilo 1906 flyttade familjen in till Göteborg. Till disponentbostaden vid Kustens Varv, vilket sedermera kallas för Taubehuset. Samma år rymmer Evert till Stockholm och tillbringar sin första natt på Klara kyrkogård där han satt sig bredvid Bellmans grav. Han berättar att han föll på knä och bad: - Gode Gud, förlåt mig här

Bellman. Li diras, ke li falis sur la genuojn kaj preĝis: – Bona Dio, pardonu min ĉi tie ĉe la tombo de Bellman! Kaj en li aŭdiĝis kantoj, li skribas.

– La arbo kun sia kvieta susuro  
nin en sian protekton deklaras,  
kaŝita en sia verda domo  
respondas la somera birdo.

Ne malproksime de tie troviĝis Hotelo Bellman, kie li enregistriĝis kaj telegrafis hejmen.

Evert studis arton kaj estis maltrankvila animo. En 1907 li fariĝis maristo. Hodiaŭ ni povas sekvi lin en liaj kantoj; ĉu li estis en la Pampo aŭ ĉu li estis en Bohuslän, la vojaĝoj estis multaj. Jen li sidis sur la "Gyldene Freden" (La Ora Paco) kaj en aliaj okazoj li dancis kun la bela "Rosa på bal" (Rosa ĉe balo).

/ Ingegerd Granat

vid Bellmans grav! Och inom honom sjöng det, skriver han,

– Trädet med sitt stilla sus  
oss i sitt skydd förklarar,  
gömd i sitt gröna hus  
sommarfågeln svarar.

Inte långt därifrån låg hotell Bellman, där tog han in och telegraferade hem.

Evert studerade konst och var en orolig själ. 1907 gick han till sjöss. Vi kan idag följa honom i hans visor, än var han i Pampas och än var han i Bohuslän, resorna blev många. Än satt han på den Gyldene Freden och vid andra tillfällen tog han sig en sväng om med den sköna Rosa på bal.

/ Ingegerd Granat

## Stokholma melodio de Evert Taube

Se hur hela Uppland står i lågor  
Kvällssol brinner bortom Solna skog  
Grön som ärg emot violetta vågor  
Brunnsviksvassen står där gäddan slog  
Långt i syd mot bleknad himmel blänker  
Fönstrens rad som guld på Södermalm  
Och på slottet vakten flaggan sänker  
Stockholm svalkas efter dagens kvalm

*Proza traduko:*

Vidu kiel tuta Uppland' flamas  
Vespersuno super Solna arbar'  
Verda kiel verdigro kontraŭ violaj ondoj  
Brunnsvika kanoj staras kie ezoko plaŭdis  
Fore, sude kontraŭ paliĝinta ĉielo brilas  
vico de fenestroj kiel oro je Södermalm  
Kastele, gardisto flagon malaltigas  
Stokholmo malvarmiĝas post la taga varmo



*Kantebla traduko:*

Vidu jen Upland' vespere brulas  
sur arbar' post Solna suna lum'  
verdajn kanojn golf' spegulas  
fiŝ' Brunsvika akve plaŭdas dum  
sude for ĉiel' paliĝas kaj en  
Sodermalm fenestra orrebril'  
flag' haŭliĝas sur kastelo suben  
en Stokholmo regas nun trankvil'

<https://www.youtube.com/watch?v=V9Lzxnj0f1c>

# Dana okazaĵo dum la Holokaŭsto

## En dansk händelse under Förintelsen



La Holokaŭsto estas terura ekzemplo de tio, kio povas okazi, se ni ne daŭrigas la debaton pri demokratio kaj la egalvaloro de homoj. Proksimume ses milionoj da judoj mortis en la Holokaŭsto. Romaoj kaj poloj ankaŭ estis submetitaj genocido bazita sur rasismaj kredoĵoj. Krome, Nazia Germanio persekutis, malliberigis kaj mortigis milojn da aliaj homoj, inkluzive de multaj handikapuloj kaj samseksemuloj.

**Forum för levande historia** (Forumo por vivanta historio) rakontas pri evento dum la milito, kie estis loko por libera pensado.

Meze de la Holokaŭsto, fine de 1943, okazis unika evento en norda Eŭropo. Malgraŭ la fakto ke Germanio okupis Danion ekde aprilo 1940, la dana registaro rifuzis trakti la preskaŭ 8 000 judajn civitanojn kaj rifuĝintojn alimaniere.

Sed post la tumulto dum la somero 1943, la germanaj okupantoj enkondukis krizostaton. La registaro ekŝiĝis. Hitler decidis ke alvenis la tempo ankaŭ por la judoj de Danio. Ĉefaj germanoj en Kopenhago likis – surprize – ke grava arestoperacio estis planita por frua oktobro kaj kiam sciigo pri la baldaŭa operacio diskoniĝis, preskaŭ ĉiuj danaj judoj sukcesis eskapi.

Ili eskapis al Svedio trans Öresund kun helpo de danaj kaj svedaj fiŝkaptistoj. La ricevo de Svedio de miloj da fuĝantaj judoj en kelkaj tagoj signifis totalan inversigon de la antaŭa restriktita politiko.

Förintelsen är ett skrämmande exempel på vad som kan hända om vi inte håller debatten om demokrati och människors lika värde vid liv. Cirka sex miljoner judar dog i Förintelsen. Också romer och polacker utsattes för folk mord grundade på rasistiska föreställningar. Därutöver förföljde, fängslade och dödade Nazityskland tusentals andra människor, bland annat många funktionsnedsatta och homosexuella.

**Forum för levande historia** berättar om en händelse under kriget, där det fanns plats för fritt tänkande.

Mitt under Förintelsen inträffade i slutet av 1943 en unik händelse i norra Europa. Trots att Tyskland hade ockuperat Danmark sedan april 1940 hade den danska regeringen vägrat att särbehandla de knappt 8000 judiska medborgare och flyktingar.

Men efter oroligheterna under sommaren 1943 införde de tyska ockupanterna undantagstillstånd. Regeringen avgick. Hitler beslutade att tiden hade kommit också för Danmarks judar. Ledande tyskar i Köpenhamn läckte – överraskande nog – ut, att en stor arresteringsaktion planerades i början av oktober och när ryktena om den förestående aktionen nådde ut, lyckades nästan alla danska judar fly.

De tog sig till Sverige över Öresund med hjälp av danska och svenska fiskare. Sveriges mottagande av tusentals flyende judar på några få dagar betydde en total omkastning av den tidigare restriktiva politiken.

La plimulto de danaj policianoj rifuzis aresti tiujn kiuj restis, sed 481 judoj estis deportitaj al la koncentrejo de Theresienstadt.

La dana civila administracio neniam ĉesis interesiĝi pri ili, kaj la plej multaj pluvivis kaj povis reveni al Danio post la fino de la milito.

/Siv

## La nacia tago de la sameoj

### Samernas nationaldag

La cirklo sur la samea flago simbolas kaj la lunon kaj la sunon, la lunringo estas blua kaj la sunringo estas ruĝa. La koloroj de la flago estas blua, ruĝa, verda kaj flava, venante de la tradicia samea kostumo, *kolt*. La kvar koloroj de la flago ankaŭ simbolas gravajn elementojn de supervivo por la sameoj.

#### Samea Nacia Tago

La Samea Nacia Tago estas komuna al ĉiuj sameoj sendepende de ĉu ili loĝas en Svedio, Norvegio, Finnlando aŭ Rusio. Ĝi estas tago kiu estas kutime festita kun agadoj kaj kulturaj eventoj.

La 15-a samea konferenco de la Samea konsilio decidis en 1992 en Helsinko, ke la komuna nacia tago de la sameoj estu la 6-a de februaro. La Nacia tago estis festita por la unua fojo en 1993. La 6-an de februaro 2007, la samea flago flirtis por la unua fojo ekster la Urbodomo de Stokholmo dum la Nacia tago. En 2014, la flago flirtis ekster la Universitato de Upsalo por la unua fojo.

#### Kial la 6an de februaro?

La unua samea nacia renkontiĝo estis okazigita en Tråante/Trondheim, Norvegio, la 6-an de februaro 1917. La renkontiĝo kunvenigis pli ol

Majoriteten danska polismän vägrade att arrestera dem som fanns kvar, men 481 judar deporterades till lägret Theresienstadt.

Den danska civila administrationen slutade aldrig att intressera sig för dem, och de flesta överlevde och kunde återvända till Danmark efter krigsslutet. /Siv



Cirkeln på sameflaggan symboliserar både månen och solen, månringen är blå och solringen är röd. Flaggans färger är blå, röd, grön och gul, kommer från den traditionella samiska dräkten, *kolt*. De fyra färgerna på flaggan symboliserar också viktiga överlevnadselement för samerna.

#### Samernas nationaldag

Samernas nationaldag är gemensam för alla samer oavsett om de bor i Sverige, Norge, Finland eller Ryssland. Det är en dag som vanligen uppmärksammas med aktiviteter och kulturarrangemang.

Samerådets 15:e samekonferens beslutade 1992 i Helsingfors att samernas gemensamma nationaldag skall vara den 6 februari. Nationaldagen firades för första gången 1993. Den 6 februari 2007 vajade för första gången den samiska flaggan utanför Stockholms stadshus på nationaldagen. 2014 vajade flaggan för första gången utanför Uppsala universitet.

#### Varför den 6 februari?

Det första samiska landsmötet hölls i Tråante/Trondheim den 6 februari 1917.

cent sameojn de Svedio kaj Norvegio, granda proporcio estis virinoj.

Estis la unua fojo en la samea historio, ke norda kaj suda sameoj el Norvegio kaj Svedio kunvenis por senlima renkontiĝo por diskuti komunajn problemojn. Tial la 6-a de februaro estis elektita kiel grava simbola tago por ĉiuj sameoj, sendepende de en kiu lando ili loĝas. La sekvan jaron en la sama tempo, simila renkontiĝo estis okazigita en la sveda urbo Östersund.

La samea flago estas por ĉiuj sameoj.

*El Interreto de Siv*

Mötet samlade över hundra samer från Sverige och Norge, därav en stor del kvinnor.

Det var första gången i den samiska historien som nord- och sydsamer från Norge och Sverige samlades till ett gränslöst möte för diskutera gemensamma problem. Därför har den 6 februari valts som en viktig symboldag för alla samer, oavsett vilket land man bor i. Året därpå vid samma tid hölls ett liknande möte i Östersund.

Den samiska flaggan är för alla samer.

*Från Internet av Siv*

## Sur Hyppeln kun la Ornitologia Asocio de Gotenburgo På Hyppeln med Göteborgs Ornitologiska Förening

de Jan Hellström



*Ventoŝirmejo de la pado sur okcidenta Hyppeln.*

Hieraŭ, kiam mi forlasis la loĝkvartalon, estis griza vetero kaj venis pluveto, sed alveninte sur la insulo Hyppeln inter la plej ekstremaj mar-ŝeroj la pluvo ĉesis kaj iomete heliĝis. Ni faris promenon ĉirkaŭ la insulo rigarde serĉante fiŝkaptantajn tufkormoranojn, nigrajn uriojn kaj preterflugantajn maranasojn. Roger Eskilsson, kiu bone konas la birdan vivon ĉi tie, gvidis la promenadon.

Post kelkaj horoj ekstere, estis bone havi varman supon kun krespoj ĉe la kutima restoracio kun mara panoramo de Öckerö.

Igår när jag åkte från bostadsområdet var det grått och kom lite lätt nederbörd, men väl ute på Hyppeln i det yttersta havsbandet höll det upp och ljusnade lite. Det blev en promenad runt ön med spaning på fiskande toppskarvar och tobisgrisslor och förbiflygande sjöorrar. Roger Eskilsson, som känner till fågellivet här ute väl, ledde denna vandring med GOF.

Efter några timmar ute var det gott med en varm soppa med pannkakor på stamstället med havsutsikt på Öckerö.





*Panoramo de Hyppeln  
al Rörö.*



*Vidaĵo de okcidenta Hyppeln.*

## Plenluno en Finnlando

de Raita Pyhälä



Ni havis tre belan plenlunon en la pasinta semajnfino. Mi provis trovi lokon plej foran de stratlampoj kaj multe marŝis. Mi fotis ankaŭ mian propran korton. Jam oni parolas



pli "lumopoluo" kaj defendas malhelon, ĉar la lumpoluo malhelpas rigardadi la ĉielon, nordlumojn kaj stelojn.

# Memorindaĵo ĉe Morups Tånge

de Renate Säfström



*Roskarl/Koluma ŝtonturnulo*



*Skärnäppa/Markalidro*

Helt magiskt

En flock med skärnäppor och roskarlar landade nära mig där jag låg på mage i tångbanken.

Absolute magia

Aro da markalidroj kaj ŝtonturnuloj alteriĝis proksime de mi, kie mi kuŝis sur la stomako en la fukbenko.



# Nordo kaj sudo

de Jan Bondesson,  
elkreskinta en la plej norda Svedio

## Norr och söder

av Jan Bondesson, uppvuxen i nordligaste Sverige



*Svedio estas longforma lando. La rekta distanco estas 1 572 km inter la plej norda punkto, Treriksröset en la komunumo de Kiruna, Laponio, kaj la plej suda, Smygehuk, en la komunumo de Trelleborg en Skanio.*

### Jan rakontas:

Mia elkreskado en la nordo signife diferencas de tiu de miaj infanoj, kiuj elkreskis en la sudo de Svedio, en Alingsås. Mi elkreskis en Svappavaara, en la landlimo inter Norvegio, Svedio kaj Finnlando.

Kiel infano, mi neniam vidis porkon, krom en bildoj. Importita kristnaska ŝinko estis havebla, sed ne estis ŝinko en la ĉiutaga vivo. Tiam homoj manĝis sekigitan boacan viandon kaj marinitan bovaĵon en ladskatoloj, importitan el Usono. Fridigitaj transportoj ne estis haveblaj tiel norden, kun la escepto de oranĝoj, kiuj venis per fridŝipo al Narvik en Norvegio kaj de tie al Kiruna per trajno.

En tiu tempo, multaj vilaĝanoj aĉetis oranĝojn rekte el la ĉaro. La sama povus validi por bananoj kaj tomatoj. Krom hejmkultivitaj terpomoj, tute ne estis legomoj. Mia avo estis la ĝenerala agento por preskaŭ ĉio, kio estis aĉetita el sudaj landoj, precipe el Germanio. Tuta segejo el Germanio estis lia plej granda importaĵo.

Tiuj kun *meänkieli* (= *nia lingvo* – finna-sveda dialekto) kiel hejma lingvo en la mindistrikto nomiĝas *Lantalaiset*, dum tiuj en Tornedalen laŭdire estas ĉefe nur meänkieli-parolantoj.

Miaj kunludantoj estis ĉefe *lantalaiset* kaj sameoj. La sameaj infanoj venis de la

*Sverige är ett avlångt land. Fågelvägen är det 1 572 km mellan den nordligaste punkten, Treriksröset i Kiruna kommun Lappland och den sydligaste, Smygehuk i Trelleborgs kommun i Skåne.*

### Jan berättar:

Min uppväxt i norr skiljde sig väsentligt från mina barns, som växte upp i södra Sverige, i Alingsås. Jag växte upp i Svappavaara, i gränslandet mellan Norge, Sverige och Finland.

Som barn såg jag aldrig någon gris, annat än på bild. Importerad julskinka förekom, men i vardagslag fanns ingen skinka. Då åt man torkat renkött och corned beef på burk, importerad från USA. Kylda transporter fanns inte dit upp med undantag för apelsiner, som kom med kylfartyg till Narvik och därifrån till Kiruna på tåg.

Då stod många bybor och köpte apelsiner direkt från vagnen. Detsamma kunde gälla bananer och tomater. Utöver egenodlad potatis förekom inga grönsaker alls. Min farfar var generalagent för i stort sett allt som köptes från sydligare länder, framför allt från Tyskland. Ett helt sågverk från Tyskland var hans största import.

De med meänkieli (= *vårt språk* – en finsksvensk dialekt) som hemspråk i gruvdistriktet kallas *Lantalaiset*, medan de i Tornedalen i huvudsak bara sägs vara meänkielitalande.

Mina lekkamrater var i huvudsak *lantalaiset* och *samer*. Samebarnen kom från

loĝlernejo en Gällivare dum decembro – januaro.

En Svappavaara, la sameoj havis la t.n. dispartigon de boacogregoj, t.e. ke boacoj estis kolektitaj, buĉitaj kaj venditaj. En la herbejo de la najbaro, ni vilaĝinfanoj kaj la sameaj infanoj havis nian propran boacan dispartigon. Ĉirkaŭe kuŝis multe da boacaj kornaroj kaj ni vilaĝaj infanoj kuris kun ili sur la kapo dum la sameaj knaboj ekzercis ĵeti lazojn. Ni sovaĝe batalis por liberiĝi.



La vilaĝo kaj ĉirkaŭaj vilaĝoj ankaŭ loĝigis pli maljunajn sameojn kiuj ne plu povis elteni la boacbredan vivon. Tiuj, kiuj mortis dum la jaro, estis kondukita, kiam la frostoj malaperis, al Jukkasjärvi, kie la sameoj havis sian tombejon.

La diservo estis bazita sur *læstadian*-ismo, branĉo ene de la sveda eklezio. La ĉirkaŭaj vilaĝoj laŭvice organizis renkontiĝojn, kiuj daŭris dum trisemajnaj periodoj.

Kelkajn matenojn dum la semajno, ni infanoj en klasoj 4–5 estis devigitaj partopreni la preĝkunveno en Svappavaara. Estis turmento sidi sur malmolaj lignaj benkoj kaj aŭskulti la predikojn de 12 pastroj en *meänkieli*. La 13-a tradukiĝis al la sveda.

Estis glosolalio, *likutuksia*, kaj ĝi finiĝis per pardonpeto al ni infanoj – sed mi ne scias pro kio. Eble ni estis rigardataj kiel senkulpaj kristinfanoj.

En mia lernejo, la sveda estis la instrulingvo. En mia familio la hejma lingvo estis la sveda, same kiel en la familio de alia samklasano. Ĝi donis al ni lingvajn avantaĝojn. Dum paŭzoj, *meänkieli* estis la lingvo de elekto. Hodiaŭ mi

internatskolan i Gällivare under december – januari.

I Svappavaara hade samerna s.k. renskiljning, dvs. man samlade ihop renar, slaktade och sålde. På grannens äng hade vi bybarn och samebarnen vår egen renskiljning. Det fanns gott om renhorn liggande och vi bybarn sprang omkring med dem på huvudet, medan samepojarna tränade att kasta lasso. Vi kämpade vilt för att komma loss.

I byn och kringliggande byar inhystes även äldre samer, som inte orkade med renskötarlivet längre. De, som dog under året, fördes, när tjälen gått ur jorden, till Jukkasjärvi, där samerna hade sin kyrkogård.

Gudstjänstlivet vilade på læstadianismen en gren inom svenska kyrkan. Byarna runtomkring turades om att anordna möten, som varade i treveckorsperioder.

Ett par förmiddagar under en vecka var vi barn i klass 4 – 5 tvingade att delta i bönemötet i Svappavaara. Det var en plåga att sitta på hårda träbänkar och lyssna på 12 prästers predikningar på *meänkieli*. Den 13:de översatte till svenska.

Det förekom tungomålstalande, likutuksia, och avslutades med att man bad oss barn om förlåtelse – för vad vet jag inte. Kanske sågs vi som oskyldiga kristusbarn.

I min skola var det ju svenska som gällde. I min familj var hemspråket svenska liksom hos ytterligare en klasskamrats familj. Det gav ju oss språkliga fördelar. På rasterna var det *meänkieli* som gällde. Idag kan jag inte tala det språket längre, men jag förstår det fortfarande.

Som barn fick jag en gång gästa min moster som var ladugårdsförman på gården Julita i Småland. En ko hade kalvat i ett skogsparti och vi var på väg att se hur det hade gått. På vägen såg jag en rad svarta lakritsbitar. Min moster stoppade mig, innan jag hann plocka upp en för att stoppa i mun. Det var svarta skogssniglar.

På grund av klimatförändringen har idag många arter tagit sig norrut. Då jag växte upp

ne plu povas paroli tiun lingvon, sed mi ankoraŭ komprenas ĝin.

Kiel infano, mi iam vizitis mian onklinon, kiu estis stalestrino en la bieno Julita en Smolando. Iam bovino naskis en arbara areo kaj ni estis survoje por vidi kiel tio finiĝis. Survoje mi vidis vicon de nigraj glicirizpecoj. Mia onklino haltigis min antaŭ ol mi povis preni unu por meti en mian buŝon. Ili estis nigra arbaraj limakoj.

Pro la klimata ŝanĝiĝo, multaj specioj nun moviĝas pli norden. Kiam mi elkreskis, apenaŭ ekzistis "blankaj birdoj" kiel ekzemple mevoj kaj ŝternoj, nun estas amase da ili.

La kvin grandaj rabobestoj, kiuj nun estas protektitaj kontraŭ ekstermiĝo, tamen troviĝis. Estis urso, lupoj, guloj, linkoj kaj reĝa aglo. Mi renkontis ilin ĉiujn, krom linkoj.

La gubernia administracio tradicie respondecis pri donado de ĉasaj kaj fiŝkaptaj rajtoj al la publiko kaj determini la maksimuman nombron da boacoj permesitaj en la areo. Estas risko de tropaŝtado. Niaj najbaraj landoj, Norvegio kaj Finnlando, rigardas kun malaprobado niajn boacojn ŝtelante la boaclikenon de ilia boacaro.

*Sapmi* – la lando de la sameoj – estas dividita en sameajn vilaĝojn. Nur sameoj kiuj okupiĝas pri boacpaŝtado povas esti membroj de samea vilaĝo. Tiuj kiuj ne faras tion, ja la plimulto de tiuj, kiuj konsideras sin sameoj, ne havas la rajton ĉasi kaj fiŝkapti en la vilaĝo. Tio estas fonto de malkonkordo inter sameoj.

Lastatempe, la Alta kortumo decidis, ke la vilaĝo Girjas Sámi transprenu la rajtojn de la gubernia administracio en Norrbotten. Tio donis al Girjas pli grandajn ŝancojn adapti la ĉasadon al la migradoj kaj naskoj de la boacoj. Multaj aliaj sameaj vilaĝoj nun petas la samajn rajtojn kiel Girjas en siaj respektivaj distriktoj.

Mia bofrato estas de samea deveno kaj posedas boac-insignon (*vidu bildon kaj bildtekston dekstre*). Li ne estas boacpaŝtisto kaj tial ne rajtas esti parto de iu samea vilaĝo, sed pro nostalgiaj kialoj li kaj mia fratino posedas kelkajn boacojn, kontraktitajn al boacpaŝtisto en la vilaĝo Talma Sami. Tamen,


fanns det knappast några "vitfåglar" som t.ex. måsar och trutar, nu är det fullt av dem.

De fem stora rovdjur, som nu har skydd mot utrotning, fanns däremot. Det var björn, varg, järv, lodjur och kungsörn. Jag har stött på dem alla, utom lodjur.

Länsstyrelsen har traditionellt haft ansvar för att bevilja allmänheten jakt och fiskerätt och bestämma högsta antalet tillåtna renar i området. Risk finns nämligen för överbetning. Våra grannländer, Norge och Finland ser med ogillande på att våra renar stjäla deras renars renlav.

*Sapmi* – samernas land – är indelat i samebyar. Medlem i sameby kan bara samer, som idkar renskötsel, vara. De som inte gör det, dvs. majoriteten av de, som räknar sig som samer, har inte rätt till jakt och fiske i byn, vilket är en källa till osämja mellan samer.

Nyligen har högsta domstolen fastslagit, att Girjas sameby tar över Länsstyrelsens rätt i Norrbotten. Det har givit Girjas större möjligheter att anpassa jakten till renarnas vandringar och kalvning. Många andra samebyar begär nu i domstol samma rätt som Girjas i sina respektive län.



**Renmärken** är en kombination av snitt skurna i renarnas höger och vänster öra. Renmärket är unikt för varje renägare och utifrån märkningen kan man identifiera ägaren till renen – en person.

**Boacaj insignoj** estas kombinaĵo de incizoj tranĉitaj en la dekstrajn kaj maldekstrajn orelojn de la boacoj. La boaca insigno estas unika por ĉiu boaca posedanto kaj surbaze de la insigno, la posedanto de la boaco povas esti identigita.

